

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 - PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 - LE PERREUX-sur-MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue de Milngavie 49150 - BAUGE

C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN.

==== la n^o: 3 F. Abono: 13 F. Kotizo: 2 F. Sume: 15 F. ====

www

La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent antaŭ la 10-a de decembro, marto, junio kaj septembro.

www

---- N^o 12^o ---- BULLETIN TRIMESTRIEL ---- TRIMONATA BULTENO ----
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

----- JANUARO 1980 -----

www

BILETO DE LA PREZIDANTO.

C' est dans la joie de Noël, et à la veille de l' année nouvelle, que j' adresse ce billet à nos amis, lecteurs de notre bulletin, membres actifs et sympathisants de notre association.

Tout d' abord, je forme les voeux les plus sincères pour que tout ce que vous entreprendrez en 1980 pour la vie de notre Mouvement, contribue au progrès, dans notre pays et dans le monde, de la paix et de la fraternité, et à une plus grande ouverture à l' appel divin de l' Enfant de Bethléem.

C' est plus particulièrement aux enfants et aux jeunes que va ma pensée. Quel monde leur préparons-nous? Vers quels lendemains vont-ils après cette année où nous avons été invités à tourner notre regard vers ceux dont notre génération a le devoir de construire l' avenir?

Parmi les aspects de ce futur, il en est un qui nous est particulièrement cher: le développement d' un profond sentiment fraternel, d' un pays à l' autre, d' une nation à l' autre. Si les enfants du monde entier avaient en commun, à côté de leur langue maternelle, la pratique de la Langue Universelle, et si, grâce à elle, des liens amicaux, des correspondances, des rencontres devenaient courants et habituels, si des séjours de vacances où des nationalités diverses se rencontreraient avec ce moyen de contact direct et personnel, avaient lieu chaque année, quels progrès seraient réalisés dans la construction d' un avenir de compréhension entre les hommes!

Il appartient à tous les groupements locaux de tenter quelque chose pour que s' amorce et se développe, à partir de l' enfance, cet esprit d' universalité concrétisé par le moyen d' échange le plus rationnel, un langage commun. Il faut que des dévouements bénévoles, parmi les espérantistes - qui sont par leur âge et par vocation amis de l' enfance - se montrent capables de grouper et d' intéresser les plus jeunes.

Il faut "rajeunir" l' Esperanto: il faut que l' étude prenne la forme d' un jeu, que des lectures soient conformes au goût que manifestent les enfants petits et grands pour les aventures, l' imagination, l' humour. Ainsi, chacun a pu apprécier l' édition du fameux " Astérix " en Esperanto. De telles initiatives

.../...

sont capables de faire progresser l' intérêt pour la pratique de la langue. Mais pour que les éditeurs aient le courage de proposer de tels ouvrages, il faut qu' ils sentent l' existence d' une nombreuse clientèle potentielle.

L' éducation des jeunes aux valeurs spirituelles, à la domination des instincts de violence, à la fraternité inscrite dans la charte internationale des droits de l' homme, a tout à gagner de la création, grâce à l' Esperanto, de contacts et d' échanges, qui peuvent avoir l' attrait d' un jeu, mais portent en germe un monde plus épanoui, surtout si ces activités sont imprégnées de la lumière de Jésus-Christ.

René-Claude COLAS.

xx

JESUO

La "vivon de Jesuo" ni serĉas sen trovi ĝin, en la evangelio, ĉar tiu ĉi celas ne la vivon de Jesuo, sed la nian, nian savon.

Tiaj aferoj estis skribitaj, por ke vi kredu, ke Jesuo estas Kristo, Difilo, kaj kredante, vi havu la vivon (Jn 20, 31).

Nur post kiam ni jam trovis nian vivon en la evangelio, ni trovas ankaŭ la vivon de Jesuo. Por lerni, kiel Li vivis, ni devas vivi en tiu, kiu deziras instrui nin. "Mi mem ne plu vivas; kiu vivas en mi, tiu estas Jesuo (Gal. 2, 20).

Dimitry Marajkovsky (Jésus inconnu)

xx

PREĜO DE LA FLUANTA AKVO

Mi longdaŭre serĉis la feliĉon;
Sur senfinaj vojoj ĝi forkuris,
Kiel akvo forfluas el la fingroj.
Sed mi finfine komprenis, Sinjoro,
Ke Vi sola estas ĝojo mia.

Al mi, Vi malfermis la okulojn.
Al mi, Vi malfermis la koron.
Al mi, Vi donacis la mondon.
Por ke mi travivu en ĝi Vian amon.

Kiuj ĉiutage serĉas Vin,
Tiu vere akceptas Vin.

El Le caillou blanc tradukis A. B.

xx

SPIRITA BILETO

Nur necesas: ami Dion kaj nian proksimulon.

Dio estas Amo kaj Li volas esti amata: "Amu Dion je via tuta koro, je via tuta animo, je via tuta spirito".

La fonto de la amo, kiun ni devas direkti al Dio kaj al la aliaj, troviĝas en ni mem. Ĝia valorigo dependas de nia interna vivo t.e. de la aktivado de la funde de ni mem por esti pli kaj pli unuiĝinta kun Jesuo-Kristo, kiu vivas en ni. Sekve, tiu ama unuiĝo devigas nin ĉiam fari la volon de Dio. Ĉar, kiam oni vere amas, oni faras la volon de la amato.

Tiel, malgraŭ nia malforteco, ni fariĝas kunlaborantoj de Dio en Lia ago sur ni mem kaj sur la aliaj.

Por ke tiu mirinda plano realiĝu, necesas preĝi por peti la Dian gracon.

Eldorn.

xx

NIA MEMBRARO

Novaj membroj 1980: 1) S-ro A. JAEGER (Paris); 2) S-ro VERMEERE (M & L); 3) S-ino MOCQUERY (Paris); 4) S-ro SANTERNE (Paris)

Membroj bonfarantoj 1980: 1) S-to SCHNEIDER (Yonne); 2) F-ino ESPRIT (Hte-M); 3) S-ro LE MARQUAND (C-du-N); 4) S-ro BIRON (Sarthe)

Novaj dumvivaj membroj 1980: 43 kaj 44) G-roj HENRY (Es-sonne); 45) S-to GOUDE (M & L).

Specialan dankon al la bonfarantoj kaj dumvivaj membroj, kiuj multe helpas nin.

LINGVA ANGULO

Nia konkurso 1980 komenciĝas kun la tradukproponoj de S-ino MICHAU (M), S-roj BOURGOIS (B), DAUCHEZ (D), GUILLON (G), LE MARQUAND (L) kaj RIBOT (R).

- 1) au bas mot: malmultedire, malaltetakse (B); minimume (D,L); precizvorte (G); plej malmulte taksate (M); ĉe plej malalta, ĉe minimuma takso (R).
- 2) filer le train: strete, spione sekvi (B); rapide sekvi (D); pleje rapidi, antaŭe plenrapidi (L).
- 3) le fil du rasoir: tranĉrando de la razilo (B); tranĉa parto de la razilo (D); tranĉakuta bordo de la razilo (G); razila tranĉrando, razileĝo (L); razilakreco(M).
- 4) il faut cerner la vérité: necesas ĝuste situigi la veron, scii, kie estas la vero (B); necesas ĉirkaŭigi la veron (D); necesas alproksimiĝi al la veraĵo (G); ampleksenda estas la vero (L); necesas evidentiĝi la veron (M); necesas reliefigi, izoligi la veron (R).
- 5) tu fais le coup: bonŝanco trafas vin, vi estas bonŝanca, al vi la sorto ridas (B); ĉu vi riskas tian agadon? (D); vi plenumas la agon (G); vi gajnis, vi sukcesis (L); ĉu ci aŭdacas ŝercataki? (M); vi kuraĝos ekaĝi (R).
- 6) à quoi bon se casser la nénette?: pro kio cerbumi, vanas klopodi (B); kial stre-ĉe cerbumi, kial turmenti sian kapon (D); kial do elcerbumi (G); kion utilis lac-egiĝi (L); kial pene cerbumi (M); kiucele malkvietiĝi (R).
- 7) il a avalé son parapluie: li paveske, malhumile rektigas la korpon (B); rigide stari, kvazaŭ oni ĵus glutis ombrelon (D); li estas stature rektega (G); li estas rigidmiena (L); li staras fostosimile (R).
- 8) crotté comme un barbet: kotiĝinta kiel vaganta pudelo, kiel kloakisto (B); kot-trempita kvazaŭ pudelo (D); vere kotkovrita (G); kota kiel pudelo (L); kotita kiel longhara hundo (M); tiel kotŝmirita kiel hundaĉo (R).
- 9) être sur la balance: troviĝi en nestabila situacio (B); stari sur ekvilibrilo, esti necerta (D); troviĝi en hezitema stato (G); esti en kompara juĝo (L); oscili inter du alternoj (M); sidi en ŝanceliĝa sinteno, sur balancilo (R).
- 10) c' est un bourreau de travail: li estas laborvoranto, nelacigebla laboranto (B); avidega je laboro (D); li estas tiel laborema kiel ŝarĝobesto (G); li senri-poze laboradas (L); li laborigas kiel pundevice (M); laboron li avide enĝlutas (R).

Unua klasifiko por 1980: 1) S-ro RIBOT (7 p.); 2) en egaleco S-ino MICHAU kaj S-ro DAUCHEZ (6); 4) en egaleco S-roj BOURGOIS kaj LE MARQUAND (2); 6) S-ro GUILLON (1).

Novaj esprimoj proponitaj de S-ro Bourgois: 1) entrer dans la danse; 2) enfancer le clou; 3) changer de cap; 4) arrêter les frais; 5) cracher le morceau; 6) un luxe de détails; 7) faire école; 8) n' écouter que son courage; 9) comme dans un fauteuil; 10) ça finira en queue de poisson.

RENOVIGO DE LA KOMITATO

En 1980 finos sian mandaton: S-ino Michau, F-ino Preux, S-ro Véron kaj S-ino Vincent.

Ili estas reelekteblaj, sed ni volonte akceptos pliajn kandidatojn. Ĉiu ano pli ol 18-jara rajtas kandidatiĝi kiel komitatano.

La kvar supre nomitaj komitatanoj kaj la novaĝ kandidatoj bonvolu TUJ anonci sian kandidatiĝon al S-ro Despiney.

*

VENONTA KOMITATKUNVENO

Dimanĉon, 9-an de marto 1980, 4 bis, rue de la Cerisaie 75004-PARIS. La sidejo estos malfermita ekde la 11-a horo. Eblos tagmanĝi kune en memserva restoracio. La kunveno komenciĝos je la 14.15.

Observantoj daŭre bonvenaj.

ESPERANTO EN LA RADIO. La esperantistoj havas la elsendojn, kiujn ili meritas.

Subtenu la staciojn, kiuj dissendas en la Internacia Lingvo. Ofte skribu, eĉ se vi ne sukcesas kapti la koncernan stacion. Petu la Esperanto-programojn.

Por ni katolikoj, la plej subtenenda estas kompreneble Radiovaticana

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 14-a DE OKTOBRO 1979

Ĉeestas: pastroj Bourdon kaj Degrelle, F-to Marmou, S-ino Vincent, F-ino Preux, S-roj Despiney kaj Villeneuve.

Senkulpigitaj: S-ino Michau, F-ino Vanneau, S-ro Bessière.

Nia prezidanto S-ro Colas telefonas el la kliniko, ke li estos operaciita. Ni preĝas por lia rapida resaniĝo.

Post aprobo de la protokolo de la lasta kunsido kaj akcepto de la proponita tagordo, ni raportas pri la pasintaj kongresoj: la FKEA-kong. en Lille; ni aprobas la raporton de D-ro Dumas aperinta en la lasta bulteno - la UK en Lucerno plensukcesa kaj perfekte organizita kun bona ekumena Diservo en la katedralo - IKUE-kong. en Luksemburgo bonege organizita de P. Kindler; ni gratulas P. Degrelle pro lia elekto kiel estrarano de IKUE.

P. Bourdon informas, ke E^o-pilgrimado en Banneux okazos ĉiujare la 2-an dimanĉon de septembro. Li legas projekton de letero sendota al la Ĝenerala sekretario de la Eŭkaristia Kongreso, proponante la partoprenon de IKUE. Li anoncas, ke P. Manteau-Bonamy, prizorganto de la "Mission de l'Immaculée" en Lourdes, sekvas la skriban kurson de A. Ribot. Estus necese, ke de tempo al tempo pariza esperantisto vizitu lin por lin helpi.

R. Despiney montras paroŝan folion kun artikoleto pri la libro de P. Korytkowski. Li parolas ankaŭ pri sia agado apud la franca episkoparo... ne tiom sukcesa, la afero ne estante sufiĉe matura.

P. Bourdon ŝatus, ke aliaj anoj imitu nian Ĝeneralan sekretarion, mendante deko(j)n da libroj "Une langue internationale..."

Eksteraj rilatoj: kun turismaj oficejoj - faldfolioj pri Esperanto en Lille kaj Roubaix.

kun la radio: Radio Vaticana ne ricevas sufiĉe da leteroj el Francujo.

Laborplano: la venonta landa kongreso de FKEA okazos en Sens je Pentekosto 1980:

Ekumena kongreso en Nederlando en 1981.

Nia bulteno retrovos sian antaŭan vizaĝon, ĉar nia amiko R. Olivaux ne plu povas prizorgi la rozkolorajn paĝojn. Ni tre dankas lin pro la farita laboro.

170 anoj kotizas al FKEA. F-to Marmou eldonas la bultenon en 280 ekz.

Francaj anoj de IKUE nombras 57 + 10 dumvivaj.

La venonta komitatkunveno okazos la 9-an de decembro en Paris.

Protokolis F-ino Preux kaj R. Despiney.

* * *

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 9-a DE DECEMBRO 1979

Ĉeestas: P. Bourdon, F-to Marmou, S-inoj Michau kaj Vincent, F-inoj Preux kaj Vanneau, S-roj Colas, Despiney kaj Villeneuve.

Senkulpigitaj: P. Degrelle, S-roj Bessière kaj Véron.

Observanto: S-ro Vérité el Pantin.

Ni preĝas por la ripozo de la animo de Jean Ligot, ekskasisto de FKEA.

Ni aprobas la protokolon de la oktobra kunveno kaj akceptas la tagordon. Kongreso de FKEA: la domo de la Dominikaninoj en Sens ne estos libera je Pentekosto. Ni serĉas alian lokon.

Temo: La katolikoj kaj Eŭkaristio.

Rilatoj kun IKUE: estus dezirinde, ke FKEA iĝu landa ligo de IKUE, kaj ne filio.

P. Degrelle, peranto de IKUE, jam ricevis 14 kotizojn por 1980.

Unu paĝo de EK estos dediĉata al la infanoj.

La libro-servo de IKUE estas en ROMO, sed D-ro de Salvo petis, ke P. Degrelle ankaŭ prizorgu ĝin en Franclando.

LOURDES: P. Bourdon sendi al P. Magnani, prez. de IKUE, kopion de la letero jam sendita al la organizantoj de la Eŭkaristia Kongreso de 1981.

P. Manteau-Bonamy daŭre lernas Esperanton. S-ro Colas helpas lin.

Varbado: pluraj novaj anoj aliĝis.

Bulteno: la enhavo estas tre riĉa, valora. Mankas novaĵoj pri la anoj. Estus dezirinde, ke ili skribu pli ofte al la asocio.

Financaj: la stato estas sana, sed la rezervo tre etiĝas.

Diversaĵoj: P. Bourdon partoprenis la trilandan kongreson en Aachen en novembro.

Li preparas afiŝon pri Esperanto; eŭropaj skoltoj eklernas Esperanton.

La venonta kunveno okazos la 9-an de marto 1980 en Paris.

Protokolis F-ino G. Preux.

La renkontiĝo okazis en plej granda diskreteco; tiel, la itala Prezidento eniris Vatikanon sen akompanantoj, nur li kaj la ŝoforo. La kunesto daŭris du horojn kaj duonon. Laŭ onidiroj, oni interŝanĝis informojn kaj impresojn pri la ĵusaj vojaĝoj de Pertini al F.R.Germanujo kaj Jugoslavio, kaj de la Papo al Pollando, Irlando kaj Usono. Ne estis konfirmite, male, ke oni alfrontis la temon de la revizio de la Konkordato inter Italujo kaj la Sankta Seĝo.

La italaj ĵurnaloj amplekse menciis la okazintaĵon.

Estas kurioze, ke la itala Prezidento apartenas al partio (socialista), ne nur laikeca, sed ankaŭ, en sia historio, ĉiam kontraŭeklezia.

=====

TIGRINO KAJ OGROKATO (daŭrigo)

"Baldaŭ vi povos aŭdi la sonoradon," la vilaĝano diris. Ŝi atendis la vesperiĝon. Jam la ventego kvietiĝis kaj la nebrile ruĝa maso estis subakviĝonta en la okcidentan maron. Sur la monteto la templo lumigata de nebrila lumo, klare vidiĝis. Baldaŭ, ĉio iĝis nebula kaj mallumeta. Sonoris, sonoregis el la fundo de la lago. "Terure, terure por aŭdi!" li ŝtopis la orelojn per montraĵ fingroj tremante per la tuta korpo. La sonorado sonoris nur unu fojon, sed la eŝo restadis longe, longe super la lago. "Ho, terure!" ree li kriis, jam ne tremante. Tigrino kun aplombo demandis lin: "Kial terure? - nur sonoris." Nenion li respondis, nur rigardadis ŝin per larĝe malfermitaj okuloj. Ŝi ekstaris kaj ekpaŝis malrapide en la direkton al la templo. Sur la vojo kelkaj vilaĝanoj ŝin vokis por haltigi. "Kien vi volas iri?" Nenion respondante ŝi nur ridetis, sed ŝiaj okuloj pli akre radiis.

La templo estis granda kaj malnova, sed ne tro ruiniĝinta. En la ĉeftemplo fronte al la portalo Budho sidis kaj malantaŭe staris Dek ses Araĥanoj kun diversaj trajtoj sur la alta podio. Vespera, apenaŭ sonoris la subakviĝinta sonorilo, ekaperis bluaj bruloj, kiuj lumigis la sanktulojn; tiam, ili abrupte malfermis la okulojn larĝe, kaj ekmoviĝis. Post momento, ili iris malsupren per ŝtuparo al la planko. Budho sidis apud la granda ligna tamtamo kaj prenante frapilon ekfrapis ĝin; samtempe, Dek ses Araĥanoj ekdancis en ringo ĉirkaŭ Budho. Ili kantis:

"Ho, ĥaj. Ho, ĥaj? Ho, ĥaj. Ho!
Dek ses Araĥanoj nun estas dancantaj,
Laŭ takto de Budho, kapojn skuante.
Monstroj, fantomoj, spiritoj, demonoj,
Eliru el tomboj, el marĉoj, el l' lago,
Aliĝu, aliĝu, sed neniam ja Tigrino.
Ho, ĥaj. Ho, ĥaj. Ho, ĥaj. Ho!"

(daŭrigota)

=====

BIBLIA NOMARO (daŭrigo)

AGABO

Dufoje vi aperis en Nova Testamento,
Ho profeto Agabo, kiel dia legato.
En urbo Anofio vi vortas pri malsato
Koncerne tutan mondon en kaŭdia momento.

Ĉiuj vin alrigardas kun streĉita atento
Kiam paŭlozonhelpe troviĝis laŭreato
Por esti mallibere pacodona oblato
De Kristo ligofere sufera komplemento.

Sed ne falas kuraĝo de plenfidaj kristanoj:
Ili kuras rapide al la helpiga tasko
Disdone el siaĵoj kiel amakompanoj.

Ne timas l' Apostolo kaj kun tutfroŝa drasto
Li urĝas tra la mondo al kredigaj paganoj
Laŭ jesua ekzemplo: ĉiam por ĝoja Pasko!

14/2/78

AGACO

Patroj manĝis vinberojn tutcente nenaturajn
Kaj la gefilaj dentoj suferas pro agaco
Sen pek' iliaflanke. Ĉu estas do aŭdaco
Peti de la Juĝisto rezultojn pli naturajn?

(daŭrigo sur p. 7)

KONGRESO DE FKEA

SENS 31-an de majo/2-an de junio 1980

*

KONGRESEJO: Monastère de la Nativité 105, rue Victor Guichard 89100-SENS

ALIGKOTIZOJ: individuo 20 F; geedza paro 30 F; infano ĝis 16-jara, blindulo, ali-landano, sacerdoto, religiul(in)o, KELI-ano: senpage

LIMDATO DE ALIĜO: 30-an de aprilo 1980.

*

PROGRAMO

Sabaton 31-an de majo: ekde la 15-a horo, akcepto en la monaĥinejo
17.00: vizito de la katedralo kaj aliaj vidindaĵoj
post la vespermanĝo: varietea vespero - kantezercado

Dimanĉon 1-an de junio: 9.30: ĝenerala kunveno
11.30: komitatkunveno
posttagmeze: "La katolikoj kaj Eŭkaristio" (debato)
Diservo (horo fiksota)

post la vespermanĝo: distra vespero
Lundon 2-an de junio: programo fiksota

*

RESTADPREZOJ

Tagnokta pensio: 45 F; luado de littukoj (por la tuta restado): 7 F
BONVOLU KUNPORTI VIAJN BUS- kaj TUALET-TUKOJN, kaj la KANTIKARON.

AGRABLAN KONGRESON EN SENS!!!

=====

ALIĜILO (1)

sendota al S-ino J. VINCENT 26 bis, rue de Milngavie 49150-BAUGE antaŭ la 30/4/80
p.ĉ.k. ROUEN 574 88 R.

Mi aliĝas al la kongreso laŭ la ĉisupraj kondiĉoj kaj sendas la pagon per
poŝtĉeko/bankĉeko (2)

kotizo (en kategorio)F

S-ro/S-ino/F-ino (2) (nomo kaj voknomo)
adreso:

naskiĝdato (nur por infanoj):

Mi bezonas fervoja(j)n rabatilo(j)n

- (1) Bonvolu plenigi unu aliĝilon por ĉiu familiano; uzu samformatan paperon.
- (2) Forstreu la senutilaĵojn.

Mi petas la jenajn servojn:

	sabaton	dimanĉon	lundon
vespermanĝon			
tranoktadon			
matenmanĝon			
tagmanĝon			

luadon de littukoj: JES NE

Mi proponas la jenajn servojn:

enkasigon de la restadprezoj:	JES	NE
tenadon de la libroservo:	JES	NE
prizorgadon de la infanoj:	JES	NE
monkolektadon ĉe la diservo:	JES	NE
aliajn:		

DATO:

SUBSKRIBO:

Oni fakte nur vidas malbonoj inaŭgustajn:
Ĉu bonas, ke senĉese pro ĝuakuta ŝmaco
Fariĝas ies lipoj malbelaĉa grimaco,
Por doni al aliaj konkludojn plej terurajn?

"Ne plu povas ekzisti, proklamas la Sinjoro,
Tiu dirmaniero en mia kara lando:
Nur pagos la fakturon responda debĉtoto".

Sed ĉu ne venos poste, pro saviga komando,
Surkruca grimacanto kaj ĉies kuratoro
Malgraŭ dia verdikto? Jes veras la demando!

15/2/78

LA VIVO EN GRESILLON

PRINTEMPO: Internacia semajno (infanrenkonto) de la 6-a ĝis la 13-a de aprilo 80

SOMERO: Prelegoj, debatoj, studado de la lingvo, ekskursoj de la 1-a ĝis la 21-a de julio

Kursoj: rekmetada por komencantoj, grupa praktikado, studo de verkoj, manlaboroj, ekskursoj de la 23-a ĝis de julio ĝis la 11-a de aŭgusto

Artlaboro: fotoarto, folkloraj dancoj, ekskursoj, praktikado de la lingvo de la 13-a de aŭgusto ĝis la 1-a de septembro.

Informoj, aliĝoj: ESPERANTO KULTURDOMO Kastelo Grésillon 49150 - BAUGE

KELKAJ KVARVERSAJ STROFOJ

La viglaj infanoj	Harmonio	Por ni, kristanoj, amo
Nia granda espero	De Esperanto	Al Dio kaj al frat'
Por la venka konkero	En konstanto	Ĉiutage kaj ĝis sat'
Kun la veteranoj.	Komunio.	Estas la ĉefprogramo.

Vere amu, diras Dio	Venka Pasko	La espero
Sen ĉes'.	De nia Krist'	Al roka Dio
Ho jes	Por trompsafist'	Jen litanio
Tere ama melodio.	For la masko.	Ĝis vespero.

Ho mia Dio	Guton post guto	Al Dio: fidelo
Je vi mi kredas	Frapon post frapo	Al la hom': koramo
Neniam cedas	Nova etapo	Al la grac': aklamo
Al trompa fido.	Por incitŝuto.	Al peko: ribelo.

La infano preĝas	Krista paco	Ho Jesuo
Kun granda fid'	En nia mond'	Mia Sinjor'
Kaj dia rid'	Jen ĝoja rond'	Ke Via kor'
Liakore reĝas.	De amgraco.	Estu ĝuo.

Kiam venos mia morto
Mi foriros sen ia timo
Ĉar jam estas mia kutim'
Vivi en vi, mia Forto.

Roger DEGRELLEE

GRAVA ALVOKO

Estus tre dezirinde, ke kiel eble plej multe da katolikaj esperantistoj imitu la prezidanton de IKUE, P. Magnani. Li lastatempe skribis al la Papo, por peti, ke li uzu Esperanton en sia venonta saluto al la mondo. Ĉu niaj legantoj bonvolos tion fari, emfazante, ke iu ajn homo, post mallonga lernado de la Internacia Lingvo, povas ĝin kompreni?

REFERENDUMO Kiel vi aŭdis pri FKEA? Kial vi aliĝis?
Kion vi atendas de FKEA? Kion vi opinias pri FKE?

Nomo, voknomo kaj adreso - sendu al S-ino Vincent antaŭ la 10-a de marto 1980.

NOVA RUBRIKO

LA LEGANTOJ (NE) SKRIBAS

Ĉu ni povos en nia venonta bulteno forigi la negacion? Ĉu vi vere ne havas ion por skribi al la redakcio? Se via kapo estas tute malplena, kial vi ne sendus interesajn eltiraĵojn el leteroj de viaj korespondantoj?

Kuraĝon! Ek al viaj fontoplumoj aŭ globetkrajonoj!

xx

ANGULO DE LA KASISTINO

Vi trovos ĉisube la novan kotiztabelon. Dankon al tiuj, kiuj jam renovigis sia(j)n kotizo(j)n aŭ/kaj abono(j)n. Ili tre grave helpas min. Specialan dankon al la membroj "bonfarantoj", kiuj ebligas la informan laboron.

Bonvolu noti, ke P. G. Baudry ne plu estas peranto por la "Biblia Revuo." De nun, sendu vian abonon aŭ reabonon al "Assoc. Franç. Cath. pour l' Esperanto" c.c.p. 2324 93 N ROUEN, kiu transdonas.

xx

KOTIZTABLELO 1980

IKUE kun "Espero Katolika" 52 F
Peranto: R. Degrelle c.c.p. NANCY 2555 38 L.

* * * *

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" 15 F
Infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj 7,50 F
Bonfaranto 75 F
Dumviva membro 300 F

UFE kun "Revue Française" 90 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro 120 F

Abono al "Biblia Revuo" 36 F
Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2324 93 N.

xx

Dépôt légal: 4^{ème} trimestre 1980 !! Polycopié par F. M. C.

Papier de presse n° 34 745 !! Prieuré St-Martin La Houssaye-en-Brie

Directeur-gérant: Gaston Véron !! 77610 - FONTENAY TRESIGNY FRANCE

xx

TRE GRAVA PETO

Por ĉiu adresŝanĝo, bonvolu sendi vian banderolon kaj 4 F al la redaktoro S-ino J. Vincent 26 bis, rue de Milngavie 49150 - BAUGE; dankegon!